Subtenu la informadon!

Abonu Pilo-Press
Jara abonkotizo
30,-- GM

**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 13/1975 - 8 aprilo 1975
Aperas ĉiusemajne

Pĉk. Nürnberg 819-56-851

## Internaciaj kursoj kaj pedagogia seminario en Bulgario

Sofio (pp) De la 5 - 24 aŭgusto 1975 la Instruista Sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio okaziĝos internaciajn Esperanto-kursojn por instruistoj kaj internacian pedagogian Esperanto-seminarion en Burgas, kv. Meden Rudnik.

En la seminario povas partopreni nur diplomitaj esperantistoj kaj multjaraj kursgvidantoj, por refreŝigo kaj altigo de la lingva nivelo, por diskuti problemojn de la organiza, informa kaj ide-eduka laboro de esperantistoj.

Je la fino de la kursoj resp. seminario ĉiu partoprenanto devas fari ekzamenon. La ekzameno por instruistoj okazos antaŭ oficiala ŝtata komisiono.

Limdato de aliĝo estas la 31 majo 1975. Informojn donas: Okrâĵen Esperantski Komitet, bulv. Ĥristo Botev 97, Sofio 3, Bulgario.

## Baldaŭ nova lernolibro por germanlingvanoj

Bruselo (pp) Baldaŭ, supozeble, antaŭ la ĉi-jara somero aperos nova Esperanto-lernolibro por germanlingvanoj, nome la germana versio de la angla lernolibro "Esperanto a new approach" de W. Auld sub la germana titolo "Esperanto einmal anders". La lernolibron eldonas Heroldo de Esperanto, Bruselo, kaj estas nun presata en Varsovio.

## Kiamaniere ni povos atingi la veran ekumenon?

Graz (pp) Sub la supra temo okazos en la kadro de la 60a Universala Kongreso de Esperanto la 7a Interreligia Kunveno Esperantista (IRKE). Informojn donas la prezidanto por la ĉi-jara IRKE: Josef Eder, Eggenberger Gürtel 32, A-8020 Graz.

## Junulara renkontiĝo en Nunspeet

Groningen, NL (pp) De la 6 - 8 junio 1975 Nederlanda Esperanto-Junularo organizos renkontiĝon en Nunspeet, konferencejo "De Grote Bunte", Grotebunteweg 11. (Nunspeet situas sude de Zwolle).

El la programo: Prelego de Wim Jansen pri planlingvoj, laborgrupoj por komencantoj kaj progresantoj k.a.
Aliĝkotizo (por tranoktado, manĝoj kaj progamoj) estas 25 gld/gm. Germanaj partoprenontoj pagu sian kotizon al Klaus Schubert, 2 Hamburg 65, Duvenstedter Triftweg 26 c, PSchKonto Hamburg 3502 41 -202. Informojn donas: Nederlanda Esperanto-Junularo, Coranthijnestraat 75, Groningen 8003, Nederlando.

## Novaĵoj de Adalbert Masuhr

Teherano (pp) Adalbert Masuhr, depost septembro 1974 vojaĝanta tra Afriko, Aŭstralio, Novzelando kaj landoj de Azio, restadas ĝis la 20 aprilo en Teherano. De tie li daŭrigas sian vojaĝon aŭtobuse tra Irano al Afganistano kaj Pakistano. En Hindio li estis dum veturado en malluma vagonaro priŝtelita. Meze de junio li revenos hejmen al Elmshorn.

## 54-a Bonvolmesaĝo de la Kimra Junularo

Nürnberg (pp). Ek de la jaro 1922 regule eliras ĉiujare, okaze de la Bonvoltago, 18 majo, Bonvolmesaĝo de la Junularo de la Mondo, el Kimrujo.

La 54-a Bonvolmesaĝo de la Junularo de la Mondo, je Bonvoltago, 1975 tekstas jene:

Hodiaŭ la Kimra Junularo salutas la Junularon de aliaj landoj je Bonvoltago.

Estas tragike, ke tiom da homoj aktuale suferas pro malsato kaj manko - en mondo de abundo. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de tio estas la malŝparado.

La elspezado de mono por armiloj estas morala malŝparado. La krea forto de la homaro direktiĝas al detruado anstataŭ al la pozitiva subtenado de la vivo mem. Ni petegas al la registaroj de la mondo ĉesigi ĉi tiun malŝparadon kaj atenti nian petegon por Paco kaj Bonvolo.

Tamen, ni junuloj el ĉiuj landoj, devas ankaŭ ludi nian rolon en la batalo kontraŭ la malŝparado. Ni ne malŝparu nian tempon kaj energion pro iluziaj kaj senutilaj celoj. Pli bone, ni utiligu ĉiujn niajn talentojn kaj rimedojn por doni servon al niaj kunuloj kaj por plibonigi sociajn vivkondiĉojn.

Anstataŭ malŝparado kaj detruado ni postulas konservadon kaj konstruadon.

*********

La Bonvolmesaĝo aperis en 16 lingvoj, inter ili Esperanto. La legantoj estas petataj diskonigi la mesaĝon. Proponojn, kritikojn, opiniojn oni skribu al: Secretary, Goodwill Message, Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Kimrujo, Grandbritio.

*************

## Nova itala iniciato

Romo (pp) Laŭ raporto de Radio Romo, Esperanto-Fako, la 24-an de februaro 1975, la sekretario de la Internacia Oficejo de la itala socialdemokrata partio (P.S.D.I.), Vladimiro Mihelj, oficiale skribis al senatano Egidio Ariosto kaj al la deputito Enrico Rizzi, kiuj estas membroj de la Eŭropa Parlamento, rilate al la tri demandoj pri la eblecoj stimuli la instruadon kaj uzadon de Esperanto en Eŭropa kadro, kiujn la nederlanda deputito Cees Laban antaŭ kelka tempo direktis al la Komitato de la Eŭropo-komunumoj.

En la letero Vladimiro Mihelj memorigis, ke P.S.D.I. oficiale proponis al la Socialisma Internacio la adopton de Esperanto, kiel kuniga lingvo por la socialismaj partioj kaj la mondo de l' laboro, kaj publikigis dulingvan broŝuron, jam tradukitan en la svedan kaj germanan. Oni ankaŭ memorigis, ke la itala socialdemokrata partio proponis al la Internacio okazigi en Romo, dum septembro de venonta jaro, la unuan internacian kongreson de la esperantistaj socialistoj.

La letero ankaŭ atentigas pri la preteco de la ĝenerala sekretario de la hungaraj sindikatoj proponi la adopton de Esperanto kiel kuniga lingvo al la Monda Ligo de Sindikatoj (de socialismaj landoj), aŭspiciante, ke poste Esperanto povu ankaŭ utili kiel kuniga lingvo por la okcidentaj sindikatoj. La letero konkludas, ke aperas evidenta la neceso, ke la iniciato de la nederlanda deputito estu apogata kaj subtenata de similaj iniciatoj de la socialdemokrata partio ĉe la Eŭropa Parlamento.

5a Kultura Semajnfino de SEL

Saarbrücken (pp) Sarlanda Esperanto-Ligo okazigos sian 5an Kulturan Semajnfinon de la 2a - 4a majo 1975 en la konferencejo "Junkerwald" de la "Arbeitskammer des Saarlandes" en Blieskastel-Niederwürzbach. La programo antaûvidas jenajn kursojn kaj prelegojn:

A. Por komencantoj: Enkonduko en la Internacian Lingvon Esperanto. Lernolibro: W. Auld, Esperanto einmal anders. Povas partopreni ankaû franclingvanoj. Kursestroj estas Karl Burger kaj Walter Ehrmanntraut.

B. Por progresintoj kun antaûkonoj: parolaj kaj tradukaj ekzercoj por profundigi lingvajn konojn. Ekzerclibro: W. Auld, Paŝoj al plena posedo. Kursestroj estas Reinhard Haupenthal kaj Heinz Dieter Maas.

C. Por Esperanto-parolantoj okazos prelegserio pri la temo "Psikolingvistiko kaj interlingvistiko" de d-ro Tazio Carlevaro, Neuchâtel, Svislando.

Krome okazos i.a. katolika diservo (Dekano Jakob Bergweiler), vingustumado.

Aliĝojn oni sendu ĝis la 20a aprilo al Sarlanda Esperanto-Ligo, p/a Reinhard Haupenthal, 6602 Dudweiler, Franz-Schubert-Str. 26

*******************

Denove intensa kurso en Paderborn

Paderborn (pp) En la universitato de Paderborn denove okazas nun intensaj kursoj de Esperanto, de la 1a ĝis 12a de aprilo. La kursojn partoprenas i.a. 11 geinstruistoj el la distrikto Paderborn. Docentoj de la jam tradiciaj kursoj estas Oberstudienrat Uwe Joachim Moritz, Stolberg, Inĝ. Dragomir Smolic, Zagreb, kaj S-ino D-rino Flora Szabo-Felsö, advokatino el Pécs, Hungario.

++++++++++++++++++++

Esperanto en la radio

Vieno. La sabata elsendo de Radio Vieno estis bone aûdebla ĉi tie en Nürnberg. Ni proponas al ĉiuj, kiuj ĝis nun dum la vintra tempo ne sukcesis kapti tiun stacion, nun denove provi aûskulti al Vieno, ili certe sukcesos nun. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher okupis sin pri la "aûstra jartrideko". La kultura programero konigis al la aûskultantoj leteron el Finnlando de ERnst Rixner pri prezentado de islanda nacia teatro.- La kultura parto de la Vienaj elsendoj de la 12/13 aprilo 1975 temos pri "Malto".

Romo. Tiu stacio lastdimanĉe estis kaptebla sur ondo 41 m, ĉi tie en Nürnberg. Tamen perturboj ĝenis la aûdeblon.

Berno. Ges-roj Gacond komencis recenzan serion pri "Esperanto en perspektivo".

Varsovio. Dimanĉe, 6 aprilo, posttagmeze je la 16,30 horo Varsovio silentis ne nur en Nürnberg, sed ankaû en Hamburgo kaj Bruselo, kiel ni telefone eksciis. Pro tio multaj amikoj de la Esperanto-Ekspreso, kiuj aûskultas la programon dimanĉe posttagmeze, eble ne aûdis la alvokon pri koresponda rivalado inter la aûskultantoj de Finnlando kaj FR Germanio. Tamen la dimanĉ-vespera programo sur ondo 200 m estis bone aûdebla. - Same mi bone povis kapti ĉi-foje la Esperanto-anguleton en la kadro de la germanlingva programo je la 22a horo. Jerzy Grum prezentis en tiu anguleto recenzon de la unua numero de Eûropa Esperanto-Revuo.

## Rivalado inter Finnlando kaj FR Germanio

Varsovio (pp) De monatoj Finnlando tenas la unuan lokon en la statistiko pri ĉiumonataj korespondaĵoj al Pola Radio, Esperanto-Redakcio. Tiun rekordon Finnlando ŝuldiĝas ĉefe al unu aŭskultanto, nomita la "kolono" de la Esperanto-redakcio.
En la Esperanto-Ekspreso de la 6 aprilo Jerzy Grum alvokis la aŭskultantojn en Federacia Respubliko Germanio al koresponda rivalado kun Finnlando. Li petis ĉiujn geaŭskultantojn, kiuj aŭskultis al la Esperanto-Ekspreso, tuj skribi al la redakcio, aŭ poŝtkarton aŭ leteron.

Ankaŭ Pilo-Press alvokas ĉiujn legantojn, kiuj aŭskultas al la programo de Pola Radio, skribi laŭeble tuj post ricevo de ĉi tiu PP-eldono, al

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46
PL-00-950 Warszawa 1, Pollando

kun rimarkoj pri la aŭskultita programo, ĉefe de la lastdimanĉa Esperanto-Ekspreso.

Ni montru per tiu kampanjo, ke FR Germanio ankaŭ povos ekpreni la unuan lokon en la koresponda statistiko. Certe tio estas interesa kaj utila eksperimento, por montri kiom da germanaj esperantistoj fakte aŭskultas al la polaj Esperanto-elsendoj. Por ke tiu eksperimento estu sukcesa, necesas, ke fakte ĉiu skribu tuj.

La rezulton oni povos aŭdi en la unua ĵaŭda leterkesto de la monato majo.

******************

Tiu alvoko ne signifas, ke oni nur skribu al la Pola Radio. Bonvolu ankaŭ skribi al la aliaj stacioj, kiuj elsendas en Esperanto.
Jen la ĉefaj adresoj:

ORF, Esperanto-Redakcio, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio

Radio Sofia, Esperanto-Fako, Sofia, Bulgario

Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00182 Roma, Italio

Schweizerischer Kurzwellendienst, Esperanto, CH-3000 Bern 16

Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Radio Pekino, Esperanto-Redakcio, Pekino, Ĉinio

******************

## Varsoviaj dementoj

Varsovio (pp) En sia Esperanto-Ekspreso de la 6 aprilo 1975 Pola Radio dementis oficiale la informojn de la Esperanto-Ekspreso de la 30 marto 1975:

1) Ne estas vere, ke ek de la 1 aprilo 1975 funkcios pramŝipo inter Bialistoko kaj Kopenhago por transporti kongresanojn al la UK en Kopenhago.

2) Ne estas vere, ke estis fondita "Klubo de Esperanto reformita". Speciale oni akcentis, ke eraroj en Esperanto restas eraroj.

La du informoj de aŭskultantoj montriĝis kiel aprilaj ŝercoj. Krome oni akcentis, ke la onidiro pri "Liĥtenŝtajna kolono" estas senbaza. Olaavi Kaalevaa ankoraŭ loĝas en Finnlando!

***********

Esperanto en Radio estas Esperanto en la praktiko!
Aŭskultu kaj skribu al la Esperanto-redakcioj de la radio-stacioj!